

Espero Katolika



Numero 4-6/2013

Aprilo-Junio 2013

Sur la kovrilo: *Historia renkonto inter du Papoj: la frata ĉirkaŭbrako inter Francisko kaj Benedikto la 16-a en Kastelgandolfo (v. p. 33).*

ENHAVO

“NI HAVAS LA PAPON!”

La anonco de la elekto de Francisko	23
Biografieto de la nova Papo	25

LA TAGOJ DE LA KONKLAVO

La komenco	26
La dua tago	28
Blanka fumado	29

LA UNUAJ SEMAJNOJ KUN PAPO FRANCISKO

La tagon post la elekto	29
15.3: Aŭdienco kun la Kardinalaro	30
16.3: Aŭdienco kun la reprezentantoj de la amas-komunikiloj	30
17.3: Meso kaj Anĝeluso pri la Mizerikordo de Dio	31
19.3: Meso por la komenco de la petra servado	32
22.3: Aŭdienco kun la diplomataro	33
23.3: Vizito al la emerita Papo Benedikto la 16-a	33
28.3: Sankta Ĵaŭdo	34
31.3: Pasko: La unua Mesaĝo ‘ Urbi et orbi ’	35

BENEDIKTO LA 16-a, LA PLEJ LONGA MONATO DE GRANDA ANIMO

La lastaj tagoj kun la nun emerita Papo	36
Almenaŭ unu tuj komprenis lian latinlingvan rezigno-anoncon	39

MOVADO	40
---------------	----

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * **Dissendolisto:** <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

“NI HAVAS LA PAPON!”



Vatikano
la 13-an de Marto 2013

Je la horo 19.06 en Romo la blanka fumo, kiu eliris el la kamentubo sur la Siksta Kapelo kaj la festanta sonorado de la sonoriloj de la Baziliko de Sankta Petro anoncis la elekton de la 266-a posteulo de Petro. Sekvis la oficiala anonco, eldirita el la centra loĝio de la vatikana Baziliko fare de kardinalo Jean-Louis Tauran.

**Annuntio vobis gaudium magnum;
habemus Papam:
Eminentissimum ac Reverendissimum Dominum,
Dominum Georgium Marium
Sanctae Romanae Ecclesiae Cardinalem Bergoglio
qui sibi nomen imposuit Franciscum**

«Mi anoncas al vi grandan ĝojon. Ni havas la Papon: tre eminentan kaj respektendan sinjoron Georgon Marion, la Kardinalon de la sankta roma Eklezio Bergoglio-n, kiu al si surmetis la nomon Francisko».

Preskaŭ unu horon poste la nova Papo aperis en la centra loĝio de la vatikana Baziliko: tre patrecaj estis liaj vortoj:

«Fratoj kaj fratinoj, bonan vesperon!

Vi scias, ke la devo de la Konklavo estis doni Episkopon al Romo. Ŝajnas, ke miaj fratoj la Kardinaloj iris preni lin preskaŭ el la fino de la mondo... sed ni estas ĉi tie...

Mi vin dankas pro la akcepto. La dioceza komunumo de Romo havas sian episkopon: Dankon!

Kaj antaŭ ĉio, mi deziras preĝi por nia emerita Episkopo, Benedikto la 16a. Ni ĉiuj preĝu por li, por ke la Sinjoro benu lin kaj por ke la Madono gardu lin.

[Trapreĝo de Patro Nia, Saluton Maria kaj de la Gloron al la Patro].



Kaj nun ni komencu ĉi tiun iradon: Episkopo kaj popolo. Ĉi tiun iradon de la Eklezio de Romo, kiu estas tiu, kiu estras en la karitato ĉiujn Ekleziojn. Irado de frateco, de amo, de konfido inter ni. Ni ĉiam preĝu por ni: unuj por la aliaj. Ni preĝu por la tuta mondo, por ke estu granda frateco. Mi deziras por Vi, ke ĉi tiu eklezia irado, kiun ni hodiaŭ komencas kaj por kiu helpos

min mia Kardinalo Vikario, ĉi tie ĉeestanta, estu fruktodona por la evangelizado de ĉi tiu tiom bela urbo!

Kaj nun mi deziras doni la benon, sed antaŭe – antaŭe mi petas al vi komplezon; antaŭ ol la Episkopo benos la popolon, mi petas, ke vi preĝu la Sinjoron, por ke Li benu min: la preĝon de la popolo, petantan benon por sia Episkopo. Ni faru silente ĉi tiun vian preĝon por mi. [Silenta preĝo]

Nun mi donas la Benon al vi kaj al la tuta mondo, al ĉiuj bonvolaj viroj kaj virinoj.

Kaj post la beno “Urbi et orbi” (al Romo kaj al la mondo) sekvis ankoraŭ la al-



dona saluto de la papo Francisko per simplaj vortoj kaj amemaj esprimoj:

«Fratoj kaj fratinoj, mi lasas vin. Multajn dankojn pro via akcepto. Preĝu por mi kaj ĝis baldaŭ! Ni revidiĝos baldaŭ: mi volas morgaŭ iri preĝi ĉe la Madono, por ke Ŝi savogardu la tutan Romon. Bonan nokton kaj bonan ripozon!».

BIOGRAFIETO DE LA NOVA PAPO

La unua papo alveninta el Amerikoj estas la argentina jezuita Jorge Mario Bergoglio, 76-jaraĝa, ĉefepiskopo de Buenos Aires ekde 1998. Ĝi estas elstara figuro en la tuta kontinento kaj simpla paŝtisto multe amata en sia diocezo, kiun li travojaĝis ankaŭ per subtera fervojo kaj aŭtobusoj.



“Mia popolo estas malriĉa kaj mi estas unu el ili”, li iam diris por klarigi la elekton loĝi en apartamento kaj kuiri al si la vespermanĝon. Al siaj pastroj li ĉiam rekomendis mizerikordon, kuraĝon kaj malfermitajn pordojn. “La plej malbona afero, kiu povas okazi en la Eklezio”, li klarigis en iuj cirkonstancoj, “estas tio, kion de Lubac nomas spirita mondumeco, nome, meti sin en la centron”. Kaj kiam li mencias la socian justecon, li invitas relegi la Katekismojn, la Dek Ordonojn kaj la Beatecojn. Spite al sia deteniĝema karaktero, li iĝis referenca figuro pro sia sinteno dum la ekonomia krizo, kiu trafis la landon en 2001.

En la argentina ĉefurbo li naskiĝis la 17-an de Decembro 1936, filo de enmigrintoj el la norditalia regiono Piemonto; lia patro Mario estis librotenisto, oficisto de la fervojoj, lia patrino Regina Sivori prizorgis la hejmon kaj la edukadon de la kvin infanoj.

Post diplomiĝo kiel ĥemia inĝeniero, li elektis la vojon de la pastreco enirante la diocezan seminarion. La 11-an de Marto 1958 li transiris al la novicejo de la Societo de Jesuo. Li kompletigis la humanismajn studojn en Ĉilio kaj en 1963, post reveno al Argentino, li doktoriĝis pri filozofio ĉe kolegio Sankta Jozefo en San Miguel. In-

ter 1964 kaj 1965 li instruis literaturon kaj psikologion ĉe kolegio de la Senmakula en Santa Fé kaj en 1966 li instruis la samajn studobjektojn ĉe kolegio de la Savanto en Buenos Aires. De 1967 ĝis 1970 li studis teologion, doktoriĝante ankoraŭ ĉe kolegio Sankta Jozefo.

La 13-an de Decembro 1969 li estis ordinita pastro de ĉefepiskopo Ramón José Castellano. Li sekve daŭrigis sian formiĝon inter 1970 kaj 1971 en Hispanio kaj la 22-an de Aprilo 1973 li faris sian porĉiaman voton en la Kompanio de Jesuo. Denove en Argentino, li fariĝis majstro de noviculoj ĉe Villa Barilari en San Miguel, instruisto ĉe la fakultato pri teologio, konsultisto por la provinco de la Societo de Jesuo kaj rektoro de la kolegio.

La 31-an de Julio 1973 li estis elektita provincestro de la jezuitoj de Argentino. Ses jarojn poste li rekomencas sian laboron en la universitatoj kaj de 1980 ĝis 1986 li estis denove rektoro de kolegio Sankta Jozefo kaj samtempe paroĥestro en San Miguel. Marte de 1986 li vojaĝis al Germanio por kompletigi sian doktoriĝan tezon; poste la superuloj sendas lin al kolegio de la Savanto en Buenos Aires kaj poste al la preĝejo de la Kompanio en Córdoba, post esti tie spirita gvidanto kaj konfesprenanto.

Kardinalo Quarracino volis lin kiel sian



Bergoglio post paŝtriĝo en 1969

tre proksiman kunlaboranton en Buenos Aires. Tial la 20-an de Majo 1992 Johano Paŭlo la 2-a nomumis lin titulara episkopo de Auca kaj helpepiskopo de Buenos Aires. La 27-an de Junio li ricevas de la kardinalo en la katedralo la episkopan ordinon. Kiel devizon li elektas: *Miserando atque eligendo*, ĉerpita el la predikoj de sankta Beda la honorinda, kiu komentante la evangelian rakonton pri la voko de sankta Mateo, skribis: “Jesuo vidis publikanon, kaj ĉar Li rigardis al li kun sento de amo kaj elektis lin, Li diris al li: ‘Sekvu min’”. En la blazonon li enigis la vort-kombinon IHS, la simbolon de la Kompanio de Jesuo.

Li tuj estas nomumita episkopa vikario de Flores kaj la 21-an de Decembro 1993 li fariĝas ĝenerala vikario. Do, neniu surprizo estiĝis, kiam, la 3-an de la Junio 1997, oni levis lin al rango de helpanta ĉefepiskopo de Buenos Aires. Pasis malpli ol naŭ monatoj, kaj la 28-an de Februaro 1998 li fariĝas posteulo de kardinalo Quarracino post la morto de ĉi-lastata, kaj ĉefepiskopo, primaso de Argentino, episkopo por la orient-ritaj fideluloj de la lando, granda kanceliero de la katolika Universitato.

En la Konsistorio de la 21-a de Februaro 2001, Papo Johano Paŭlo la 2-a kreis lin kardinalo, kun la titolo de sankta Roberto Bellarmino. En Oktobro 2001 li estis nomumita aldona ĝenerala referanto ĉe la 10-a ĝenerala Asembleo de la Sinodo de la episkopoj, dediĉita al la episkopa servado.

Intertempe, en Latinameriko lia figuro iĝis pli kaj pli populara. En 2002 li rifuzis



la nomumon kiel prezidanton de la argentina episkopara konferenco, sed tri jarojn poste oni denove elektis lin, kun konfirmo por plia jartrio en 2008. Intertempe, aprile de 2005, li partoprenis en la konklavo, dum kiu oni elektis Benedikton la 16-an.

Kiel ĉefepiskopo de Buenos Aires – kun tri milionoj da loĝantoj – li aranĝis misiistan projekton bazitan sur la kunuleco kaj evangelizado. Kvar la ĉefaj celoj: malfermitaj kaj frataj komunumoj, rolo de konscia laikaro, evangelizado adresita al ĉiu loĝanto de la urbo, asistado al malriĉuloj kaj malsanuloj. Li invitis pastrojn kaj laikojn kunlabori. Septembre de 2009 li lanĉis tutlandan kampanjon de solidareco okaze de la ducentjariĝo de la landa sendependeco; la celo estis realigi 200 karitatajn agadojn ene de 2016. Kaj, laŭ kontinenta skalo, li havis grandajn esperojn laŭ la mesaĝo de la Konferenco de Aparecida (1997), kiun li difinis la «*Evangelii nuntiandi* de Latinameriko».

Oni elektis lin papo la 13-an de Marto 2013.

LA TAGOJ DE LA KONKLAVO

La komenco

Je la 10-a horo de la 12-a de Marto, en la Baziliko de Sankta Petro, oni celebris la Meson pro eligendo Romano Pontifice (por la elekto de la roma papo), komenco de la ritoj de la konklavo. Ĝin kuncelebris kardinalo dojeno Angelo Sodano kun ĉiuj kardinaloj: “Ke la Sinjoro donu baldaŭ alian bonan paŝtiston al sia Eklezio” estis la peto, kiun la popolo de Dio levis al Dio

kaj kiun kardinalo Sodano faris dum sia prediko. Li antaŭ ĉio instigis travivi ĉi tiun tempon konfidante je la mizerikordo de la Sinjoro, kiu ĉiam prigardas kun amo sian Eklezion”.

Ĉi tiujn vortojn sekvis renovigita danko al Benedikto la 16-a, kiu estigis longan kaj kortuŝan aplaŭdon de la ĉeestantoj: “Ankaŭ ni hodiaŭ – diris kardinalo Sodano – volas nin adresi, kun Kristo, al la Patro en la ĉieloj

por danki lin pro la amoplena asistado, kiun li ĉiam donas al sia sankta Eklezio kaj aparte pro la lumanta papado, kiun li donis al ni per la vivo kaj agoj de la honorata papo Benedikto la 16-a, al kiu nun ni renovigas nian tutan dankemon”.

En la Eklezio - rimarkigis kardinalo Sodano - ekzistas diverseco de donacoj, sed ĉi tiu diverseco funkcias por la unika mistika korpo de Kristo. Ĉiuj devas kunlabori kun la paŝtistoj kaj aparte kun la posteulo de Petro por konstrui la unuecon de la Eklezio. Kaj kiu estas la misio de la Papo? La fundamenta sinteno de ĉiu paŝtisto estas doni sian vivon por la ŝafoj. Kaj tio ĉefe validas por la Posteulo de Petro, ĉar ju pli alta kaj universala estas la paŝtista servado, des pli granda devas esti la karitato de la paŝtisto.

Kardinalo Sodano finis sian predikon renovigante preĝon al Dio por la nova Papo: “Miaj fratoj – li diris – ni preĝu, por ke la Sinjoro donu al ni Papon, kiu plenumu per malavara koro tian noblan mision. Ni tion petas al li per la propeto de sanktega Maria, Reĝino de la Apostoloj, per la propeto de ĉiuj martiroj kaj sanktuloj kiuj dum la jarcentoj igis glora ĉi tiun historian Eklezion de Romo”.

Post la Meso sekvis posttagmeze la preĝado de la kardinaloj en la Paŭla Ka-



pelo en Vatikano kaj ilia procesio direktan al la Siksta Kapelo, ĉantante la litaniojn de la sanktuloj. Post eniro en la kapelon ili kliniĝis fronte al la altaro, sub la fresko de la fina juĝo farita de Mikelanĝelo, kaj ili ĵuris unuvoĉe. Sekvis la unuopa ĵurado: unu post la alia la kardinaloj elektantoj atingis la centran pupitron kaj ĵuris metante la dekstran manon sur la evangelion. La envicigo estis laŭ la kardinala rango kaj servo-daŭro. La saman ordon oni sekvas por la kvar vicoj de la tabloj, je kiuj ili sidas en la Siksta Kapelo.

La konklavo komenciĝis, do, posttagmeze, per la “*extra omnes*” (“ĉiuj eksteren”), la formulo eldirita de la Mastro de la Papaj Liturgiaj Celebroj, por ordoni al la nekconcernatoj de la konklavo forlasi la Sikstan Kapelon. Ekde la roma horo 17.30

interne de la kapelo restis nur la 125 kardinaloj elektantoj.

Tiun vesperon okazis la unua balotado, kies rezulto estis anoncita de la unua fumado de la horo 19:41; ĝi estis nigra, por indiki, ke la kardinaloj ne atingis la plejmulton de la du trionoj necesaj por la elekto.



La dua tago

Ankaŭ la dua kaj tria balotadoj, de la mateno de la 13-a de Marto, estis senrezultaj, kun nigra fumado je la horo 11.38.

Ĉirkaŭ la 13-a la direktoro de la gazetara salono de la Sankta Seĝo, pastro Federico Lombardi, okazigis la unuan kunvenon kun la ĵurnalistoj ekde la komenco de la konklavo kaj liveris abundajn informojn pri la eventoj de la lastaj horoj. Interalie pastro Lombardi parolis pri tre trankvila kaj ĝoja etoso ĉe la fideluloj, kiuj atingis Placon Sanktan Petron multe pli nombraj ol atendite. La fakto, ke okazis – ĝis lia renkontiĝo kun la ĵurnalistoj – tri senrezultaj voĉdonoj, ne estas signo pri ia divido de la kardinalaro, sed temas pri normala disvolviĝo de la prudento de la kardinaloj.

Pri ili pastro Lombardi diris, ke hieraŭ vespere kaj hodiaŭ ili iris kun bona humoro kaj bonfartaj el la Domo Sankta Marta al la Siksta Kapelo; kelkaj ne uzis la buseton, sed deziris pied-iri. Por priskribi la etoson de la konklavo, la direktoro de la gazetara salono uzis la vortojn de kardinalo Lehmann, kiu pro aĝo ne partoprenis en la papa elekto, sed kiu, dum intervjuo, memorigis sian sperton dum la antaŭa konklavo. Ĝi ne estas hasta proceduro, sed tre profundiginta en etoso el granda spiritualeco kaj respondeco. Kardinalo Lehmann diris ankaŭ, ke en la kapelo oni parolas mallaŭte ĉar estas enmemiĝo. Ne eblas eviti la spiritan impreson, kiun donas la granda fresko de Mikelaĝelo.

Pastro Lombardi sciigis pri sia interparolo kun la prefekto de la papa domo, monsinjoro Georg Gänswein, al kiu li petis informojn pri la emerita Papo. Mons-ro Gänswein certigis, ke Benedikto la 16-a sekvis kun multe da atento, per multe da spirita partopreno, la eventojn pere de televido kaj li multe preĝas. Pastro Lombardi donis ankaŭ teknikajn informojn pri la ĥemiaĵoj bruligitaj por estigi la fumojn, ĉu nigrajn ĉu blankajn, pri la uzataj stovoj kaj pri la balotiloj.

Koncerne la grupon de feministinoj,

kiuj ĉeestis duonnudaj vespere de la 12-a de Marto en Placo Sankta Petro, pastro Lombardi diris, ke la homoj estis tre pli okupitaj por vidi la fumadon kaj atendi la papan elekton. “Se ili opinias veni ĉi tien por fari tiun specon de manifestacio – komentis Lombardi – mi esperas, ke ili ne malvarmumiĝos, ĉar estas froste nuntempe”.

Ĉilia ĵurnalistino parolis pri la akuzoj adresitaj ĵusdate de iu grupo al kelkaj kardinaloj, koncerne la problemon de la seksaj misuzoj. Pastro Lombardi respondis: “Ni scias, kiel grupo Snap agas de diversaj jaroj, ni konas la manieron, laŭ kiu ĝi levas siajn akuzojn kaj klopodas trovi reeĥon. Ĉi-sence neniu miris pro la fakto, ke ĝi klopodis profiti la nunajn tagojn, por rediri la akuzojn kaj doni al ili pli da reeĥo. Samtempe ili estas temoj tre bone konataj, longtempe primedititaj, pri kiuj kardinalo Mahony kaj aliaj kardinaloj donis siajn klarigojn. Ni estas konvinkitaj, ke ekzistas bonegaj motivoj, pro kiuj tiujn kardinalojn oni devas taksi estimindaj personoj, kiuj eniras la konklavon kaj kiuj tute rajtas



ĉeesti en la konklavo. Sekve, ni ne sentas nin malagrabla aŭ sub premoj fare de la pritaksoj faritaj de grupo Snap, kiuj estas laŭ mi – konkludis pastro Lombardi – tre markitaj de malpozitivaj antaŭjuĝoj”.

Blanka fumado

Post la paŭzo por la tagmanĝo okazis, komence de la posttagmezo, la kvara balo-

tado, kiu rezultis ankoraŭ negativa kaj kiun tuj sekvis la kvina balotado.

Je la 19.06 de la 13-a de Marto el la kamentubo de la Siksta Kapelo leviĝis la blanka fumado. Unu horon poste, kardinalo Jean-Louis Tauran, per la tradicia diro *Habemus Papam*, anoncis la elekton al papado de Jorge Mario Bergoglio.

LA UNUJ SEMAJNOJ KUN PAPO FRANCISKO

Jam en la komencaj tagoj de sia papado, Francisko rejunigis la vizaĝon de la Eklezio. Per simplaj, senperaj vortoj kaj senprecedencaj gestoj, ekde la beno de la romanoj al sia episkopo, vespere de la elekto, ĝis la lavado de la piedoj ankaŭ de du virinoj, unu el ili nekristana. Papo Bergoglio ne elektis la nomon Francisko hazarde. Li revas kaj klopodas realigi konkrete Eklezion malriĉan por la malriĉuloj, kun travidebla Kurio kaj Episkopoj ne plu ŝtataj burokratoj, sed paŝtistoj ‘kun laodoro de la ŝafoj’, dezirantaj servi la homaron. Ĝuste komencante de la Pontifiko, aŭ pli bone la Episkopo de Romo, kiel ŝatas sin difini Bergoglio. Sed ĉefe impresis sendube la decido vivi en la ‘kunloĝantaro’ de Domo Sankta Marta. Al la infanoj de la jezuitaj lernejoj Francisko klarigis, ke “pro psikiatria motivoj” li ne sukcesas vivi sola. Samtempe ĝi estas ankaŭ admono esti sobraj, adaptante je la moderna epoko la instruon de la malriĉuleto de Asizo, al kiu Bergoglio volas inspiriĝi. “Ili estas tro grandaj por mi, ĉi tie povas resti 300 personoj”, li diris al la ŝtatsekretario, vizitante la papajn loĝejojn.



Aliaj unuaj gestoj de Francisko estis la rezigno je solenaj papaj vestaĵoj kaj la rifuzo uzi la luksan papan aŭtomobilon, kies matrikulo estas SCV (Ŝtato de la Vatikana Civito) numero 1. Post la elekto, por reveni al la loĝejo en Domon Sankta Marta, li vojaĝis en la aŭtobuso uzata por la Konklavo kune kun la aliaj kardinaloj, la samaj al kiuj li ŝerce diris: “Ke Dio pardonu vin pro tio, kion vi faris”.

Kaj kune kun ĉi tiuj gestoj estas liaj vortoj. Ni publikigas la ĉefajn frazojn de liaj paroladoj, en la komencaj semajnoj de lia papado.

La tagon post la elekto

La 14-an de Marto, kiel li anoncis dum siaj unuaj vortoj al la fideluloj el la centra loĝio de la vatikana Baziliko, Papo Francisko iris al la roma Baziliko de Sankta Maria la Granda por preĝi al la Dipatrino. Kun si li havis florbukedon, kiun li lasis sur la altaro. Post la preĝo li atingis la “Domo de la Pastraro”-n en Romo, por preni siajn bagaĝojn, saluti la personaron kaj “por doni bonan ekzemplon”, pagi la ĉambron, kiun li uzis dum sia restado en Romo antaŭ la konklavo.

Posttagmeze, kun la kardinaloj-elektantoj, kiuj partoprenis en la Konklavo, li celebris la Meson “pro Ecclesia” (por la Eklezio). Komentante la legaĵojn Jes 2, 2-5; 1Pet 2, 4-9; Mat 16, 13-1, li interalie diris:

“En ĉi tiuj tri legaĵoj mi vidas, ke estas io komuna: la sinmovado. Paŝi, konstrui, kredkonfesi. Paŝi: nia vivo estas paŝado (...): ĉiam paŝi, je la ĉeesto de la Sinjoro, sub la lumo de la Sinjoro, klopodante tra-



La Papo pagas la fakturon de la hotelo.

vivi tiun neriproĉeblon, kiun Dio petis al Abrahamo. Konstrui. Konstrui la Eklezion. Oni parolas pri ŝtonoj: ili havas konsiston; sed vivantaj ŝtonoj, sanktoleitaĵoj de sankta Spirito. Konstrui la Eklezion, la Edzinon de Kristo sur tiu bazangula ŝtono, kiu estas la Sinjoro mem. Kredkonfesi. Ni povas paŝi tiom, kiom ni volas; ni povas konstrui multajn aferojn, sed se ni ne kredkonfesas Jesuon Kriston, la afero ne iras bone. Ni fariĝus asistanta neregistara organizaĵo, ne Eklezio, Edzino de la Sinjoro. Kiam oni ne konstruas sur la ŝtonoj, kio okazas? Okazas tio, kio okazas al la infanoj, kiam ili sur la strando faras sablajn palacojn: ĉio falegas, ĉio estas sen konsisto. Kiam oni ne kredkonfesas Jesuon Kriston, mi rememoras la frazon de Léon Bloy: ‘Kiu ne preĝas la Sinjoron, tiu preĝas la diablon’. Mi deziras, ke ĉiuj, post la nunaj tagoj de Graco, havu la kuraĝon, jes la kuraĝon, paŝi je la ĉesto de la Sinjoro, kun la Kruco de la Sinjoro; konstrui la Eklezion sur la sango de la Sinjoro, verŝita sur la Kruco; kaj kredkonfesi la unikan gloron: Jesuon la Krucumiton. Tiel la Eklezio antaŭeniros”.

**15-an de Marto 2013:
Aŭdienco kun la Kardinalaro**

“Mi esprimas mian volon servi la Evangelion kun renovigita amo, helpante la Eklezion pli kaj pli fariĝi en Kristo kaj kun Kristo la fekunda vito de la Sinjoro. Instigitaj ankaŭ de la Jaro de la Kredo, ĉiuj kune, paŝtistoj kaj fideluloj, ni klopodos fidele respondi al la deĉiama misio: alporti Jesuon Kriston al la homo kaj konduki la homon

al la renkonto kun Jesuo Kristo, Vojo, Vero kaj Vivo, reale ĉeestanta en la Eklezio kaj samtempulo de ĉiu homo. Ni neniam cedu je pesimismo, je tiu amareco, kiun la diablo proponas al ni ĉiutage: ni havu la firman certecon, ke la Sankta Spirito donas al la Eklezio, per sia potenca blovo, la kuraĝon insisti kaj ankaŭ serĉi novajn metodojn de evangelizado, por alporti la Evangelion ĝis la ekstremaj limoj de la tero.

**16-an de Marto 2013:
Aŭdienco kun la reprezentantoj de la amas-komunikiloj**

“Aparte sentata danko iras al tiuj, kiuj kapablis sekvi kaj prezenti la ĵusajn eventojn de la historio de la Eklezio atentante la pli ĝustan perspektivon por kompreni ilin: tiun de la kredo. La ekleziaj eventoj havas apartan fonan karakterizon: ili korespondas al logiko, kiu ne estas tiu de la mondumaj kategorioj. La Eklezio, fakte, kvankam ĝi certe estas homa, historia institucio kun ĉiuj postsekvaj, tamen ne havas politikan naturon, sed esence spiritan: ĝi estas la Popolo de Dio, la sankta Popolo de Dio, kiu iras renkonten al Jesuo Kristo. Li estas la Paŝtisto de la Eklezio. Li estas la centro, ne la Posteulo de Petro.

Iuj ne sciis kial la Episkopo de Romo volis nomi sin Francisko. Kelkaj pensis al Francisko Ksavero, al Francisko de Sales, ankaŭ al Francisko el Asizo. Mi rakontos al vi la historion. Dum la elekto mi havis ĉe mi la emeritan ĉefepiskopon de San-Paŭlo, ankaŭ emeritan prefekton de la Kongregacio por la pastraro, kardinalon Claudio Hummes: grandan amikon, grandan amikon! Kiam la afero ekfariĝis iom



“Kaj tū dro eniris ĉi tien”

danĝera, li kuraĝigis min. Kaj kiam la voĉoj kreskis al du trionoj, okazis la kutima aplaŭdo, ĉar oni elektis la Papon. Kaj li ĉirkaŭbrakis min, kisis min kaj diris al mi: “Ne forgesu la malriĉulojn!”. Kaj tiu diro eniris ĉi tien: la malriĉuloj, la malriĉuloj. Tuj poste, rilate al malriĉuloj, mi pensis al Francisko el Asizo. Poste, mi pensis al la militoj, dum la voĉdonkalkulo ĝis la fino. Kaj Francisko estas homo de paco. Kaj tial venis la nomo, en mian koron: Francisko el Asizo. Por mi li estas la homo de la malriĉeco, la homo de la paco, la homo, kiu amas kaj gardas la kreaĵaron; en ĉi tiu momento ankaŭ ni havas kun la kreaĵaro ne tiom bonan rilatiĝon, ĉu ne? Li estas la homo, kiu donas al ni spiriton de paco, la malriĉa homo... Ho, kiom mi deziras malriĉan Eklezion kaj por la malriĉuloj! Poste kelkaj faris diversajn spritaĵojn. “Nu, vi devus nomiĝi Hadriano, ĉar Hadriano la 6-a estis la reformanto, necesas reformi...”. Kaj alia diris al mi: “Ne, ne: via nomo devus esti Klemento”. “Sed, kial?”. “Klemento la 15-a: tiel ĉi vi venĝas pri Klemento la 14-a, kiu malfondis la Kompanion de Jesuo”. Ili estas spritaĵoj... Mi tre amas vin, kaj mi dankas vin pro ĉio, kion vi faris. Kaj mi pensas al via laboro: mi bondeziras al vi labori kun trankvilo kaj fruktodone, kaj pli kaj pli bone koni la Evangelion de Jesuo Kristo kaj la realaĵon de la Eklezio. Ĉar multaj el vi ne apartenas al la katolika Eklezio, aliaj estas nekredantoj, mi elkore donas mian benon, silente, al ĉiu el vi, respektante ĉies konsciencan, sed sciante, ke ĉiu el vi estas filo de Dio. Ke Dio benu vin!”.

17-an de Marto 2013: La Mizerikordo de Dio

En la unua dimanĉo post la elekto Papo Francisko parolis dufoje pri la Dia mizerikordo. Unue dum la Meso en la paroĥo de sankta Anna en Vatikano kaj poste dum la Anĝeluso.

“Ankaŭ ni, mi opinias, estas la popolo, kiu unuflanke volas aŭskulti Jesuon, sed aliflanke foje plaĉas al ni bastonbati la aliajn, kondamni la aliajn. Kaj la mesaĝo de Jesuo

estas alia: la mizerikordo. Por mi, mi diras tion humile, ĝi estas la plej forta mesaĝo de la Sinjoro: la mizerikordo. Ni revenu al la Sinjoro. La Sinjoro neniam laciĝas pardoni: neniam! Estas ni, kiuj laciĝas peti pardonon de Li”.

Post la Meso Francisko eliris el la eta paroĥo de Vatikano por persone manpremi po unu la ĉeestantojn. Kaj tuj poste, li surprize trairis la landlimon kun Italio por saluti la fidelulojn, kiuj estis ekster Vatikano.



Je tagmezo grandega homamaso, preskaŭ 300 mil fideluloj, ĉeestis en Placo Sankta Petro por la unua Anĝeluso de Papo Francisko.

“Fratoj kaj fratinoj, bonan tagon! La vizaĝo de Dio estas tiu de mizerikorda patro, kiu ĉiam pacienas. Ĉu vi iam pensis al la pacienco de Dio, al la pacienco, kiun Li havas por ĉiu el ni? Tiu estas lia mizerikordo. Li ĉiam havas paciencon, paciencon kun ni, Li komprenas, atendas nin, neniam laciĝas pardoni, se ni kapablas reveni al Li kun pentanta koro.

En la nunaj tagoj mi legis libron de kardinalo – kardinalo Kasper, lerta teologo, bona teologo – pri la mizerikordo. Kaj faris al mi multe da bono tiu libro, sed ne kredu, ke mi faras propagandon al la libroj de miaj kardinaloj! Tion, ne. Sed ĝi faris al mi multe da bono, multe da bono... Kardinalo Kasper diris, ke spertante mizerikordon, ĉio ŝanĝiĝas. Iom da mizerikordo igas la mondon malpli malvarma kaj pli ĝusta.

Ni bezonas bone kompreni la mizerikordon de Dio, tiun mizerikordan Patron, kiu havas multe da pacienco ... Mi memoras, mi ĵus fariĝis episkopo, ke en 1992 alvenis



al Buenos Aires la Madono de Fatimo kaj oni faris grandan Meson por la malsanuloj. Mi iris por la konfespreno al tiu Meso. Kaj preskaŭ je la fino de la Meso mi ekstaris, ĉar mi devis doni konfirmacion. Venis al mi maljuna virino, humila, tre humila, pli ol 80-jaraĝa. Mi rigardis ŝin kaj mi diris al ŝi: “Avino – ĉar ĉe ni oni tiel parolas al la maljunuloj – ĉu vi deziras konfesi vin?”. “Jes”, ŝi diris. “Sed, se vi ne pekis ...”. Kaj ŝi diris al mi: “Ni ĉiuj havas pekojn ...”. “Sed verŝajne la Sinjoro ne pardonas ilin ...”. “La Sinjoro pardonas ĉion”, ŝi diris al mi, tute certa. “Sed kiel vi scias tion?”. “Se la Sinjoro ne pardonas ĉion, la mondo ne ekzistus”. Mi sentis en mi grandan deziron demandi al ŝi: “Diru, sinjorino, ĉu vi studis en la Gregoriana Universitato?” ĉar tiu estis la saĝeco, kiun donas la Sankta Spirito: la interna saĝo pri la mizerikordo de Dio. Ni ne forgesu tion ĉi: la Sinjoro neniam laciĝas pardoni nin. La problemo estas, ke ni laciĝas, ni ne volas peti pardonon. Ke ni neniam laciĝu! Li estas la amoplena Patro, kiu ĉiam pardonas, kiu havas mizerikordan koron por ĉiuj ni. Kaj ankaŭ ni lernu esti mizerikordaj kun ĉiuj. Ni preĝe petu la propeton de la Madono, kiu havis inter siaj brakoj la Mizerikordon de Dio fariĝintan homo. Bonan dimanĉon kaj bonan tagmanĝon!”.

19-an de Marto 2013: Meso por la komenco de la petra servado

La “vera povo” de Papo estas en la humila servado al la pli malgrandaj kaj en la savogardado per boneco kaj tenereco de la tuta homaro. Ili estis la kortuŝodonaj vortoj,

per kiuj Papo Francisko inaŭguris sian papadon en la festo de sankta Jozefo Metiisto. Ĉeestis, por la unua fojo post 1000 jaroj, ekumena Patriarko de Konstantinopolo, kune kun aliaj 33 delegacioj de kristanaj Eklezioj kaj reprezentantoj de hebreoj, islamanoj, budhistoj, sikhoj, ĵainistoj. Antaŭ la Meso, dum li traveturis Placon Sanktan Petron per la sentegmenta ĵipo, li haltigis la veturilon: apud la barilo estas viro grave kripla, signo de doloro meze de oceano da entuziasmo. Papo Francisko rimarkis lin, haltis kaj kisis kaj karesis lin, restante ĉe li longtempe. Iusence la petra servado de Papo zorgema rilate al etuloj komenciĝis tie. Poste, kiam dum sia prediko li diris el kio konsistas la “povo” de Papo, liaj vortoj aspektis des pli aŭtentikaj pro la persona atesto:



“Ni neniam forgesu, ke la vera povo estas la servado kaj ankaŭ la Papo, por ekzerci la povon, devas pli kaj pli eniri tiun servadon, kies lumanta pinto estas sur la kruco; li devas sin turni al la humila, konkreta, kredoriĉa servado de sankta Jozefo, kaj kiel li malfermi la brakojn por gardi la tutan Popolon de Dio kaj akcepti kun amemo kaj tenereco la tutan homaron, aparte la pli malriĉajn, la pli malfortajn, la pli etaĵn, tiujn, kiujn Mateo priskribas en la fina juĝo pri la karitato: malsatantojn, soifantojn, fremdulojn, nudulojn, malsanulojn, enkarcerigitojn. Nur kiu servas kun amo, tiu kapablas gardi”.

“La vokiĝo al gardado tamen ne koncernas nur nin la kristanojn, sed havas dimension, kiu koncernas ĉiujn. Ĝi estas la

gardado de la tuta kreaĵaro, de la beleco de la kreaĵaro: havi respekton por ĉiu kreitaĵo de Dio kaj por la naturmedio en kiu ni vivas. Gardi la homojn, prizorgi ĉiujn, ĉiun personon, kun amo, aparte la infanojn, la maljunulojn, la pli malfortajn, kiuj ofte estas en la periferio de nia koro”.

“Mi deziras peti, bonvolu, al ĉiuj, kiuj



havas respondecajn rolojn en la ekonomio, politiko aŭ socio, al ĉiuj bonvolaj viroj kaj virinoj: ni estu ‘gardantoj’ de la kreaĵaro, de la projekto de Dio enskribita en la naturo, gardantoj de la aliulo, de la naturmedio; ni ne lasu, ke signoj de detruo kaj morto akompanu la iradon de ĉi tiu nia mondo! Sed por ‘gardi’ ni devas ankaŭ prizorgi nin mem! Ni ne devas timi la bonecon, eĉ ne la tenerecon!”.

22-an de Marto 2013: Aŭdienco kun la diplomataro

“Lukti kontraŭ la materia kaj spirita malriĉeco, konstrui la pacon kaj starigi pontojn. Ili estas orientaj punktoj de irado, al kiu mi deziras inviti por partopreno ĉiun landon, kiun vi reprezentas”; jen la kernaj instigoj, kiujn Papo Francisko adresis per sia unua parolado al la diplomataro akreditita ĉe la Sankta Seĝo, kies rilatoj estas “vere okazo de bono por la homaro. Tio ĉi fakte gravas por la Sankta Seĝo: la bono de ĉiu homo sur ĉi tiu tero”.

“Kiom da malriĉuloj estas ankoraŭ en la mondo! Kaj kiom da suferado travivas tiuj personoj! Sekvante la ekzemplon de Francisko el Asizo, la Eklezio ĉiam klopodis flegi, gardi en ĉiu angulo de la Tero tiujn, kiuj suferas pro malriĉeco, kaj mi

pensas, ke en multaj el viaj landoj vi povas vidi la sindonan laboron de tiuj kristanoj, kiuj klopodas por helpi la malsanulojn, la orfojn, la senhejmulojn kaj tiujn, kiuj estas marĝenitaj, kaj tiel ili laboras por konstrui pli justajn kaj pli humanajn sociojn.

Sed ekzistas ankaŭ alia malriĉeco, la spirita malriĉeco de niaj tagoj, kiu ĉeestas ankaŭ en landoj taksataj la pli riĉaj. Ĝi estas tio, kion Benedikto la 16-a nomas la ‘diktaturo de relativismo’, kiu lasas, ke ĉiu estu mezuro de si mem kaj endanĝerigas la kunvivadon de la homoj.

Ne estas vera paco sen la vero! Ne povas esti vera paco, se ĉiu estas la mezuro de si mem, se ĉiu povas depostuli iam kaj nur sian rajton, sen prizorgi samtempe la bonon de la aliaj, de ĉiuj, ekde la naturo, kiu estas komuna al ĉiu homa estulo sur ĉi tiu tero.

Mi vere deziras, ke la dialogo inter ni helpu konstrui pontojn inter ĉiuj homoj tiel, ke ĉiu povu trovi en la alia ne malamikon, ne konkuranton, sed fraton por akcepti kaj ĉirkaŭbraki! Sed oni ne povas konstrui pontojn inter la homoj, forgesante Dion. Sed validas ankaŭ la malo: oni ne povas travivi verajn ligojn kun Dio malatentante la aliajn. Pro tio gravas plifortigi la dialogon inter la diversaj religioj; mi pensas aparte al tiu kun Islamo. Same gravas pligrandigi la rilatecon kun la nekredantoj, por ke neniam unuarangu la malsamecoj, kiuj dividas kaj vundas, sed, kvankam en la diverseco, por ke venku la deziro konstrui verajn ligojn de amikeco inter la popoloj”.

23-an de Marto 2013: Vizito al la emerita Papo Benedikto la 16-a



Francisko per helikoptero atingis la someran restadejon de Kastelgandolfo. Tuj post lia alveno, la emerita Papo alproksimiĝis al li kaj estis belega ĉirkaŭbrako inter la du. Poste ili atingis la loĝejon kaj tuj iris al la kapelo por preĝomomento.

Tie la emerita Papo proponis la honorlokon al Papo Francisko, sed ĉi-lastata diris: "Ni estas fratoj" kaj volis, ke ambaŭ genuiĝu kune sur la sama preĝbenko. Sekvis privata interparolo en la biblioteko. Papo Francisko alportis belan ikonon al la emerita Papo. Jen la kortuŝa interparolo:



Francisko: oni diris al mi, ke ĝi titoliĝas: 'Madono de la humileco'.

Benedikto: ... de la humileco... kiel bele!

Francisko: kaj permesu al mi diri ion: mi pensis al vi...

Benedikto (*tuj manpremane la Papon*): ho, dankon!

Francisko: ... tiom humila dum via papado. Vi donis al ni multajn ekzemplojn de humileco, vere, kaj ankaŭ de tenereco.

Benedikto: dankon! Ni ne forgesu Ŝin.

28-an de Marto 2013: Sankta Jaŭdo

La ritoj de la Paska Tritago komenciĝis per la matena krisma Meso en la vatikana Baziliko kun la ĉeesto de pastroj de diocezo Romo. Al ili kaj al ĉiuj pastroj la Papo adresis fortan instigon:

"Estu paŝtistoj kun laodoro de la ŝafoj, ne administrantoj aŭ makleristoj. Estu paŝtistoj meze de la homoj, ĉar estas bon-efike senti sur la ŝultroj kaj en la koro la pezon kaj la vizaĝon de via fidela popolo, de

nijaj sanktuloj, de nijaj martiroj. Havi iliajn nomojn ĉizitajn en nijaj koroj. La bonan sacerdoton oni rekonas el la maniero laŭ kiu lia popolo estas oleita; kiam la nijaj estas oleitaj per la oleo de la ĝojo, oni tuj vidas tion, ekzemple kiam ili eliras el la Meso kun la vizaĝo de tiu, kiu ricevis bonan informon.

Nia popolo ŝatas la Evangelion predikatan kun la oleumado, ĝi ŝatas la predikatan Evangelion, kiu atingas ĝian ĉiutagan vivon, kiam la Evangelio prilumas la ekstremajn situaciojn, la periferiojn, kie la fidela popolo estas pli elmetita je la invado de tiuj, kiuj volas prirabi ĝian kredon. La homoj dankas nin, ĉar ili sentas, ke ni preĝis kun la realaĵoj de ilia ĉiutaga vivo, ĝiaj zorgoj kaj ĝojoj, afliktiĝoj kaj esperoj. Kiam ni estas en rilato kun Dio kaj kun lia popolo kaj la graco pasas tra ni, tiam ni estas sacerdotoj, perantoj inter Dio kaj la homoj".

Posttagmeze la Papo volis celebri la Meson de la Vespermanĝo de la Sinjoro ĉe la junaj enkarcerigitoj de la roma malliberejo por neplenaĝuloj. Li lavis la piedojn al 12 gejunuloj el diversaj landoj kaj religia aparteno; inter ili estis du knabinoj.



Lavi la piedojn signifas: mi estas je via servo. Kaj ankaŭ ni, inter ni, ni devas lavi la piedojn ĉiutage, unuj al la aliaj. Ĝi signifas, ke ni devas helpi nin reciproke. Foje mi koleras kontraŭ iu... kontraŭ alia... lasu! Lasu! Kaj se tiu petas de vi komplezon, faru ĝin. Helpi unuj la aliajn, tion instruas Jesuo al ni kaj tion mi faras, kaj mi faras tion tutkore, ĉar ĝi estas mia devo. Kiel pastro kaj kiel episkopo mi devas esti je via

servo. Sed ĝi estas devo, kiu fontas el mia koro: mi amas tion. Mi amas fari tion ĉar la Sinjoro tion instruis al mi. Sed ankaŭ vi, ni helpu nin reciproke ĉiam. Ni faros bonon.

31-an de Marto 2013, Pasko: La unua Mesaĝo 'Urbi et orbi'



Karaj fratoj kaj fratinoj de Romo kaj de la tuta mondo, bonan Paskon!

Kiom granda ĝojo estas por mi, povi doni al vi ĉi tiun anoncon: Kristo resurektis! Mi deziras, ke ĝi alvenu al ĉiuj hejmoj, ĉiuj familioj, aparte al tiuj, en kiuj estas pli da sufero, al la malsanulejoj, al la karceroj...

Ĉefe mi deziras, ke ĝi alvenu al ĉiuj koroj, ĉar tie Dio volas semi ĉi tiun Bonan Sciigon: Jesuo resurektis, estas espero por vi, vi ne plu estas sub la regado de pekado, de malbono! Venkis la amo, venkis la mizerikordo!

Ankaŭ ni, kiel la virinoj-disĉiploj de Jesuo, kiuj iris al la tombo kaj trovis ĝin malplena, povas demandi al ni, kiun signifon havas ĉi tiu evento (kp Luk 24, 4). Kion signifas, ke Jesuo resurektis? Ĝi signifas, ke la amo de Dio estas pli forta ol la malbono kaj ol la morto mem; ĝi signifas, ke la amo de Dio povas transformi nian vivon, florigi tiujn dezertajn regionojn, kiuj estas en niaj koroj.

Ĉi tiu amo mem, pro kiu la Filo de Dio fariĝis homo kaj trairis ĝisfine la vojon de humileco kaj memdono, ĝis la inferoj, ĝis la abismo de la dividiĝo el Dio, ĉi tiu mizerikorda amo mem inondis per lumo la mortintan korpon de Jesuo kaj transfiguris ĝin, Li transiĝis Lin al la eterna vivo. Jesuo

ne revenis al la antaŭa vivo, al la surtera vivo, sed Li eniris en la glorpLenan vivon de Dio kaj Li eniris kun nia hejmo, Li malfermis al ni estonton de espero.

Jen tio, kio la Pasko estas: ĝi estas la eliro, la transiro de la homo el la sklaveco de pekado, de la malbono, al la libereco de la amo, de la bono. Ĉar Dio estas vivo, nur vivo, kaj lia gloro estas la vivanta homo (kp Ireneo, *Adversus haereses*, 4,20,5-7).

Karaj fratoj kaj fratinoj, Kristo mortis kaj resurektis unu fojon por ĉiam kaj por ĉiuj, sed la forto de la Resurekto, ĉi tiu transiro el la sklaveco de malbono al la libereco de la bono, devas efektiviĝi ĉiuepoke, en la konkretaj spacoj de nia ekzistado, en nia ĉiutaga vivo. Kiom da dezertoj, ankoraŭ hodiaŭ, la homa estulo devas trairi! Ĉefe la dezerton, kiu estas en li, kiam mankas la amo al Dio kaj al la proksimulo, kiam mankas la konscio, ke oni estas gardanto de ĉio, kion la Kreanto donis kaj donas al ni. Sed la mizerikordo de Dio povas florigi ankaŭ la plej sekan teron, povas redoni vivon al tre sekaj ostoj (kp Jeh 37,1-14).

Tial, jen la invito, kiun mi adresas al ĉiuj: ni akceptu la gracon de la Resurekto de Kristo! Ni lasu nin esti renovigitaj de la mizerikordo de Dio, esti amataj de Jesuo, ni lasu, ke la potenco de lia amo transformu ankaŭ nian vivon, kaj ni fariĝu iloj de ĉi tiu mizerikordo, kanaloj, tra kiuj Dio povas irigacii la teron, gardi la tutan kreaĵaron kaj florigi justecon kaj pacon.

Kaj tiel ni petu al la resurektinta Kristo, kiu transformas la morton en vivon, ŝanĝi la malamon en amon, la revenĝon en pardonon, la militon en pacon. Jes, Kristo estas nia paco kaj pere de Li ni petegu pacon por la tuta mondo.

Pacon por Proksima Oriento, aparte ĉe Israelanoj kaj Palestinanoj, kiuj penas trovi la vojon de la konkordo, por ke ili redaŭrigu kun kuraĝo kaj mempreteco la intertraktojn, por ĉesigi konflikton, kiu daŭras jam de tro longa tempo. Pacon por Irako, por ke definitive finiĝu ĉiuj perfortaĵoj, kaj ĉefe por la amata Sirio, por ĝia loĝantaro vundita de

konflikto kaj por la multnombraj rifuĝintoj, kiuj atendas helpon kaj konsolon. Kiom da sango oni elverŝis! Kaj kiom da sufero kaj devas ankoraŭ esti truditaj antaŭ ol oni sukcesas trovi politikan solvon de la krizo?

Pacon por Afriko, ankoraŭ scenejo de sangoplenaj konfliktoj. Por Malio, por ke ĝi retrovu unuecon kaj stabilecon, kaj por Niĝerio, kie bedaŭrinde ne ĉesas la atencoj, kiuj grave minacas la vivon de multaj senkulpujoj, kaj kie ne malmultaj personoj, ankaŭ infanoj, estas ostaĝoj de teroristaj grupoj. Pacon por la orienta parto de Demokratia Respubliko Kongo kaj por la Centrafrika Respubliko, kie multaj estas devigataj forlasi siajn hejmojn kaj daŭre vivas en teroro.

Pacon por Azio, ĉefe por la korea duoninsulo, por ke oni superu la diverĝojn kaj maturiĝu renovigita spirito de repaciĝo.

Pacon por la tuta mondo, ankoraŭ tiom dividita de la avidemo de tiuj, kiuj serĉas facilajn gajnojn, vundita de la egoismo, kiu minacas la homan vivon kaj la familion, egoismo, kiu daŭrigas la komercadon de

homaj personoj, la sklavecon, pli vasta en ĉi tiu 21-a jarcento. Pacon por la tuta mondo, ŝirita de la perforto ligita kun la komercado de toksaj drogoj kaj de la malbonega ekspluatado de la naturaj rimedoj! Pacon por ĉi tiu nia Tero! Ke la resurektinta Jesuo alportu konsolon al la viktimoj de naturaj katastrofoj kaj igu nin respondecaj gardantoj de la kreaĵaro.



Karaj fratoj kaj fratinoj, al vi ĉiuj, kiuj aŭskultas nin en Romo kaj en ĉiu mondoparto, mi adresas la inviton de la Psalmo: «Haleluja! Gloru la Eternulon, ĉar Lia estas bona; / Ĉar eterna estas Lia boneco. / Izrael diru, ke eterna estas Lia boneco» (Psa 117,1-2).

Benedikto la 16-a, la plej longa monato de granda animo

La 11-an de Februaro la Eklezion kaj la mondon skuis la rezigno de Benedikto la 16-a je la petra servado. Tiun, kiu komence estis anonco akceptita kun miro kaj granda konsterno, oni malrapide komprenis, dum la postaj tagoj, kiel faron de longvida saĝeco. Ni revuas la etapojn, kiuj markis historian monaton.

“Fratres carissimi, non solum propter tres canonizationes ad hoc Consistorium vos convocavi...”

«Karegaj Fratoj, mi arigis vin por ĉi tiu Konsistorio ne nur por la tri sanktproklamoj...».

La latina estas mortinta lingvo por la mondo ekde centoj da jaroj, kaj jam nun ne multe uzata ankaŭ en la Eklezio. Pro tio unu el la pli sensaciaj anoncoj de la universala Eklezio ŝvebis dum pluraj minutoj meze de silenta nekompreno: ili es-

tis mallaŭtaj frazoj, eldiritaj per trankvilo apenaŭ markita de streĉiteco – kiuj parolis pri *“decisionem magni momenti pro Ecclesiae vitae communicem”*, pri «decido de granda graveco por la vivo de la Eklezio». Poste alvenis la “cunamo”: *“Conscientia mea iterum atque iterum coram Deo explorata ad cognitionem certam perveni vires meas ingravescente aetate non iam aptas esse ad munus Petrinum aequo administrandum...”*. «Post plurfoja ekzameno de mia konscienco fronte al Dio, mi atingis la certecon, ke miaj fortoj, pro alta aĝo, ne plu estas taŭgaj por plenumi laŭ taŭga maniero la petran servadon».

La efiko de la “cunamo” estis kolosa. La amaskomunikiloj flamiĝis; en la Interreto oni haste kaj lavange publikigis tŭiterajn mesaĝojn kaj grandaj literoj kara-



tertizis la interretajn paĝojn. Emociiĝema estis la unua informado, kiel ĉies reago. Granda estis la nekredemo, ĝis kiam, 48 horojn poste, merkredon la 13-an, la emocioj elimpetis per granda aplaŭdo, kiam la Papo gvidis la ĝeneralan aŭdiencon.

Tiu merkredo koincidis kun la komenco de Karesmo kaj la fideluloj atingis posttagmeze la vaticanan Bazilikon por la rito de la cindroj. La polvo, kiu je iu momento iom nigrigis la blankan hararon de la Papo, fariĝis por la vidantoj des pli granda simbolo: ĝi estis bildigo de la certeco, kiu aperis ĉe multaj: la rezigno de Benedikto la 16-a estis, preter ĉiu konsidero, gesto el eksterordinara humileco. Tion diris fine de la matena aŭdienco, kortuŝita kardinalo Bertone, ŝtatsekretario, kaj tion multe pli emfazis tion la posta, senĉesa, emociplena aplaŭdado de la starantaj fideluloj.

La rezigno estis ĝusta; ĝi ne estis ĝusta: dum la debatadoj en televidaj elsendoj kaj en la stratoj klopodis “legi” la koron de la Papo, Benedikto la 16-a mem, kun la paso de la tagoj, vortumis la profundajn motivojn je la bazo de la decido. La aŭskulto de liaj

alparoloj dum la lastaj publikaj rendevuoj kiel Papo egaligis al ekvido de la longa kaj soleca irado, kiun lia animo faris fronte al kaj apud Dio. Ĉi-sence rivelaj estis la vortoj uzitaj dum la renkontiĝo kun la romaj paroĥestroj jaŭdon la 14-an: “Kvankam nun mi retiriĝas, per la preĝado mi estas ĉiam proksima al vi ĉiuj kaj mi certas, ke ankaŭ ĉiuj vi estos proksimaj al mi, kvankam por la mondo mi restos kaŝita”.

Kaj dum kelkaj amaskomunikiloj konstante kaj banale insistis pri komplotoj kaj fuĝado, en la Eklezio la gesto de Benedikto la 16-a pli kaj pli montriĝis frukto de tre firma kredo. Kaj li mem plifortigis ĉi tiun certecon dum sia lasta Anĝeluso el la fenestro de la papa kabineto, dimanĉon la 24-an de Februaro: “La Sinjoro vokas min ‘suriri la monton’, des pli multe dediĉi min al preĝado kaj meditado. Sed tio ne signifas forlasi la Eklezion; eĉ, se Dio petas tion al mi, tio okazas ĝuste, por ke mi povu daŭre servi ĝin per la sama sindediĉo kaj per la sama amo, per kiuj mi faris ĝis nun, sed laŭ maniero pli taŭga por mia aĝo kaj miaj fortoj”.

La humila laboranto en la vitejo foriras el la vitovicoj kaj genuiĝas por koncentriĝi en preĝado fone de la kampo, ĉar li komprenis, ke ankaŭ la Vikario de Kristo havas pli ol unu manieron por prizorgi la vitejon de la Sinjoro.

“Mi ne forlasas la Krucon, sed mi restas laŭ nova maniero ĉe la krucumita Sinjoro. Mi ne plu havas la ofico-povon por la regado de la Eklezio, sed en la servado de la preĝo mi restas, por tiel diri, en la ĉirkaŭbaraĵo de Petro”. Ili estis la vortoj, kiuj reeĥis dum la lasta ĝenerala aŭdienco en Placo Sankta Petro, merkredon la 27-an de Februaro. Fronte al la Papo estis 150 mil personoj: amaso al kiu, ankoraŭfoje kaj por la lasta fojo, Benedikto la 16-a donis la certigojn de kredomajstro, interŝanĝe de la duboj de tiuj, kiuj ankoraŭ penis akcepti tion, kio okazis.

“Mi ĉiam sciis, ke en tiu ŝipo estas la Sinjoro kaj mi ĉiam sciis, ke la ŝipo de la

Eklezio ne estas mia, ne estas nia: ĝi estas lia kaj la Sinjoro ne lasas, ke ĝi dronu; Li kondukas ĝin, certe ankaŭ pere de la homoj, kiujn Li elektis, ĉar Li tiel volis. Ĝi estis kaj estas certeco, kiun neniu povas malheligi”.



Tiun 28-an de Februaro la pli longa forsaluto en la Eklezio en la plej mallonga monato de la kalendaro komenciĝis fronte al oceana ĉeestantaro: la ĵurnalistoj alvenintaj al Romo estis 3.650 el 61 nacioj, kaj apartenis al 968 informiloj en 24 diversaj lingvoj. La rektaj elsendoj en televido kaj interreto komenciĝis meze de la tago kaj daŭris preskaŭ seninterrompe ĝis la vespero. La unua momento okazis en la Klementa Salono en Vatikano, kie ĉeestis 144 kardinaloj: kun ili Benedikto jam estis servanto, kiel li volis esti: “Mi daŭre estos proksima al vi per la preĝado, aparte dum la venontaj tagoj, por ke vi estu plene obeemaj je la agado de la Sankta Spirito por la elekto de la nova Papo. Ke la Sinjoro montru al vi tion, kion Li volas. Kaj meze de vi – li daŭrigis – estas ankaŭ la estonta Papo, al kiu jam hodiaŭ mi promesas mian senkondiĉan devotecon kaj obeon”.

Je la horo 17-a la mondo spektis eventon, kiun kelkaj komentistoj komparis – pro similaj impresoj kaj altira forto – kun la alveno de la unua homo sur la Luno: Benedikto la 16-a forlasis la papan loĝejon. Poste li eniris la blankan helikopteron, kiu superflugis Romon dum la sonoriloj de ĉiuj preĝejoj sonoris.

La Papo translokiĝis al la somera restadejo en Kastelgandolfo; el ĝia centra

balkono, fronte al la miloj da personoj, kiuj atendis lin kunpremitaj en la eta placo, li forsalutis per la sama diskreteco per kiu, ok jarojn antaŭe, li aperis por la unua fojo ĉe la centra loĝio de la vatikana Baziliko: “Mi estas simple pilgrimanto, kiu komencas la lastan etapon de sia pilgrimo en ĉi tiu tero. Sed mi deziras ankoraŭfoje, kun mia koro, kun mia amo, kun mia preĝado, kun mia medito, kun miaj tutaj internaj fortoj, labori por la komuna bono kaj la bono de la Eklezio kaj de la homaro. Kaj mi sentas min tre subtenata de via simpatio. Dankon, bonan nokton!”.



“Bonan nokton”. La du vortoj, kiuj fermis papadon perdiĝis en la fona bruado de la popolamaso. La rigardoj malaltiĝis kelkmetre, el la balkono al la malfermita pordego kaj komenciĝis retronombrodeniam antaŭe imagita. Je la horo 20-a la du pordoklapoj komencis rotacii ĉirkaŭ la ĉarniroj, ĝis fermiĝo. La svisaj gvardianoj ĉesis sian deĵoron en Kastelgandolfo, ĉar ne plu estis Papo por protekti.

Restis tamen Benedikto la 16-a, ekde tiam emerita Papo. Kaj restis la eĥo de lia “bonan nokton”. Verŝajne, ĉar ne povis esti alia maniero forsaluti por Papo, kiu volis enfermiĝi kun Dio en la klaŭstro de la koro, por malfermegi en la Eklezio novan sezonon kaj doni al ĝi la forton de nova komenco.

Ĉefe impresas onin, ke apenaŭ 13 tagojn post tiu 28-a de Februaro – kvazaŭ kunligo per fadeno de nevidebla reĝisorado – la nova papado komenciĝis per la sama stilo: kun la “Fratoj kaj fratinoj, bonan vesperon!” de Papo Francisko.



Inter la multaj komentoj pri la rezigno de Benedikto la 16-a, pluraj evidentigis la fakton, ke la unua urĝa agenteja sciigo (horo 11:46 de Romo, kvin minutojn post la parolado de la Papo) estis farita de ĵurnalistino de la itala ŝtata informagentejo ANSA, **Giovanna Chirri**.

Kial? Ŝajnas, ke d-rino Chirri estis la sola ĵurnalistino, en la vatikana gazetara salono, kiu komprenis la latinlingvan paroladon de la Papo dum la konsistorio por la sanktproklamo de la martiroj de Otranto murditaj de otomanoj en 1480 kaj por la proklamo de du beatulinoj. La “vatikanistino” de ANSA tuj ekkonsciis pri la tute escepta graveco de la vortoj de Ratzinger, kaj post ricevo de konfirmo, ŝi rapide dissendis la informon, kiu ne multajn sekundojn poste aperis en la interretaj paĝoj de la tuta mondo, kaj kiu ebligis al ŝi realigi senprecedencan novaĵakaparon.

Ŝi tiel priskribis sian sperton: «Meze de la neatendita tutmonda famiĝo, por mi estas malfacile komprenigi, ĉefe al la kolegoj de aliaj landoj, ke ne estis iu ajn antaŭanonco, kaj ke la informon mi publikigis aplikante la malnovajn regulojn de la laboro de vatikanisto. Tio estas: sekvante eventon el malmultega intereso por la amas-komunikiloj kiel estis konsistorio por sanktproklamoj...

Ratzinger diris, ke li maljuniĝas: “Ingravescente aetate”. Ĉe tiuj ĉi vortoj ŝajnis, ke mano kaptis mian gorĝon kaj ke baloneto pufiĝis en mia kapo. La “Ingravescentem aetatem” estas la dokumento, per kiu Paŭlo la 6-a forprenis de la pli ol 80-jaraĝa

kardinaloj la rajton elekti Papon; ili estas la vortoj ĉe emeritiĝo. Benedikto la 16-a daŭrigis paroli en sia latino, kiu feliĉe sonis al mi komprenebla ... Mi aŭskultis, sed estis kvazaŭ mi ne aŭdus; daŭre mankis al mi la spiro kaj la kruroj tremis kvankam mi sidis; la maldekstran mi ne sukcesis bloki. Mi komencis fari sinsekvajn tele-fonvokojn, por serĉi helpon kaj konfirmojn. En Vatikano ĉiuj havis alion por fari, neniu respondis al mi. Mi spertis senton de teruro. Mi telefonis al la vatikana proparolanto Lombardi: “Pastro Federico – mi diris al li – ĉu mi bone komprenis? Ĉu la Papo demisiigis?” “Vi bone komprenis – li diris al mi per trankvila tono – li foriras la 28-an de Februaro”. Pro ekscitiĝo mi realkroĉas la telefonon, mi pensas, eĉ sen saluti. “Ek, ni elsendu”, mi diris al mia koleginino, kaj kelkajn sekundojn poste, la urĝa agenteja sciigo estis en la reto de ANSA kaj la informon relanĉis tuj la grandaj internaciaj informagentejoj. Je tiu momento mi ekploreĝis kaj inter unu singulto kaj alia mi verkis kelkajn detalojn pri la aper-maniero de la informo».

Por ĵurnalistino esti la unua, kiu dissendas gravegan informon, estas rimarkinda sukceso. Kiu scias, ĉu multaj ĵurnalistoj, jam “armitaj” de plej rafinitaj informadikaj rimedoj, sed komplete nesciantaj la latinan, ekde tiam komencis deklinacii: *rosae, rosarum, rosis...*



MOVADAJ INFORMOJ

IKUE sendis dankleteron al Papo Benedikto la 16-a

“Altestimata Sankta Patro Benedikto la 16-a, dum ĉiu tiuj tagoj niaj koroj pleniĝas per danko al la Dia providenco, kiu donis al ni eblecon dum ok jaroj kunpaŝi kun Vi. Ni direktas nian humilan dankon al la Ĉiela Patro, ke Li en ĉiuj tempoj donas al Sia popolo kuraĝajn gvidantojn. Ni deziras al Vi eldiri simplan homan vorton: “Dankon”! Ni dankas, ke Vi kiel “humila laboranto en la vinberejo de la Sinjoro” estis kuraĝa atestanto dum ĉi tiu malfacila epoko, donante al ni ekzemplon, profundigante kaj fortigante nian fidon, kuraĝigante nin en nia respondeco kaj en kaj por la Eklezio. Dankon por Viaj preĝoj, eldirita kaj verkita vorto, speciale por la trilogio pri la vivo de Jesuo Kristo. Dankon, ke Vi instruis nin pri la neceso aŭskulti, sed ankaŭ silenti. Dankon por Via vizia instigo de la Eklezio de la 21a jarcento, ke ĝi estu preta je memrenoviĝo, por tiel renovigita povi renovigi la mondon. Dankon por la proksimeco al la familioj, infanoj kaj junuloj, maljunuloj kaj malsanuloj, pastroj, monaĥoj kaj monaĥinoj, al suferantoj. Dankon por malfermo al la laikoj, kaj al la novaj teknologioj. Kaj fine: dankon por elparolita vorto en Esperanto. Sankta Patro, ni volonte aliĝas al Via invito: ni restu ligitaj en la preĝo. Jes, ni preĝos por Vi, kaj ni petas, ke Vi preĝu por ni, ke la “Dia vorto vivigu en ni... kuraĝon, memfidon kaj entuziasmon en la proklamo kaj atestado de la Evangelio” (kp Anĝelusio, 10.2.2013). Kun profunda respekto kaj unueco en Kristo, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (25.2.2013)”.

La tradukoj de ĉi tiu letero en la angla, ĉeĥa, franca, germana, hispana, itala, kroata, pola, portugala, rusa, slovaka, ukraina aperas en la TTT-ejo de IKUE: <http://www.ikue.org/papoj/benediktovxi/ikueletero2013.html>

ESPERANTO NUR SKRIBE. En la dimanĉo de Pasko 2013 Papo Francisko ne faris la mult-lingvajn bondezirojn. Sed la E-paneloj same ĉeestis, montritaj dufoje (dum pluraj sekundoj) dum la tutmonda televida elsendo. www.ikue.org/pasko2013/pasko2013.htm

PERSONOJ

Slovaka IKUE-ano forpasis. Per la reveno al la C.O. de IKUE de la koverto kun la lastaj senditaj numeroj de revuo Espero Katolika, oni eksciis pri la forpaso de s-ro Pavol Murgaš, Slovakio. Kortuŝis lia ligiteco al

IKUE: kiam li komencis loĝi en la domo por emerituloj, en Banská Bystrica, li sendigis leteron de la dom-administrantoj al IKUE, por ke oni ne ĉesigu la alsendon de la revuo al li. Li estis tre aĝa.



EN LA INTERRETO

Faldfolio: ĈETABLAJ KANTOJ KAJ PREĜOJ. La partoprenintoj de KELI-kunvenoj kaj ekumenaj kongresoj havas ankoraŭ en siaj oreloj la vortojn de Adolf Burkhardt: “Ne forgesu vian duan haŭton!” Li parolis pri ADORU, kiun oni ĉiam kunportu. Sed kien meti la libron post la antaŭ-maĝa preĝo? Kiel protekti ĝin kontraŭ saŭco-makuloj? Pro tio p. Albrecht Kronenberger enretigis pdf-dosieron, helpe de kiu organizantoj de kunvenoj povas presi la bezonatajn faldfoliojn. Oni povas elŭti la dosieron el KRISTANAJ FONTOJ: <http://fontoj.net/> > kanti > Faldfolio: ĈETABLAJ KANTOJ KAJ PREĜOJ aŭ: <http://fontoj.net/> > prepari Diservon > Faldfolio: ĈETABLAJ KANTOJ KAJ PREĜOJ. Pro la kopi-raĵtoj oni devas unue ensaluti per la pasvorto, havebla ĉe p. Kronenberger, al kiu oni povas ankaŭ peti la dokumenton doc-forme por Microsoft Word: albrecht.kronenberger@t-online.de

EKLEZIA HIMNO. La 7.4.2013 por kelkaj ortodoksaj Eklezioj la dimanĉo, tiel nomata “kruchonora”, de la Granda Fasto koincidis kun Anunĉiaco. Porokaze p. Taŭriono Smikov honore al la Sanktega Dipatrina enretigis konatan grekan eklezian himnon “Purega Virgolino” (greke - Αγνή Παρθένη, Agni Parthene), kantatan en Esperanto. Por aŭskulti: <http://ortodoksio.org/node/131>

NOVA (ETA) REKORDO POR WWW.IKUE.ORG. En la tagoj ĉirkaŭ Pasko la nombro da personoj, kiuj alklakis la paĝaron de IKUE estis alta: 30/3: 15; 31/3: 317; 1/4: 439. Kvankam la interretaj vizitkalkuliloj ne estas precizaj, tamen la datumo markis por IKUE novan “rekordon” ekde kiam oni kalkulas vizitojn.